

Paul Gerhardt,  
Transdonu vian vojon

*tradukita de Hendrik Arie de Hoog*

1. Transdonu vian vojon,  
la zorgojn de la kor',  
turmentojn aŭ malĝojn  
al Dio, la Sinjor'!  
La mondon Li ja movas.  
La vent' obias Lin,  
por nub' Li vojon trovas;  
ĉu Li ne gvidus vin?

2. Al l' Eternulo fidu  
en pen' aŭ en esper';  
Li viajn agojn gvidu  
kaj certas la prosper'.  
Se homo nur lamentas  
pri sia sort' sen fin',  
lin Dio ne atentas,  
nur preg' atingas Lin.

3. ....  
.....  
.....  
.....  
.....  
.....  
.....  
.....  
.....

...

Paul Gerhardt,  
Translasu ĉion, kio

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

1. Translasu ĉion, kio  
Vin premas en la kor'  
Al nia kara Dio,  
Foriĝos la dolor'.  
La patro, kiu movas  
La nubojn super ni,  
Li certe vojon trovas,  
Sur kiu iros vi.

2. Al Dio vi nur fidu,  
Kaj bone fartos vi ;  
Sur Lian verkon vidu,  
Miriga estas ĝi.  
Vi ne devigos Dion,  
Eĉ se vi streĉas vin;  
Atingos vi nenion,  
Se vi ne petas Lin.

3. Ho patro, kio bonas  
Por nia hom-natur',  
Vi certe tion konas,  
Ni kredu tion nur.  
Kaj kiun Vi elektas,  
Kreskigas Vi fortul',  
Kaj tiun Vi protektas,  
Ho saĝa Eternul'.

...

4. La vojon vian ame  
 elektas Li; tra bon'  
 aŭ tra suferoj same.  
 Li gvidos laŭ bezon'.  
 Nenio Lin retenas,  
 ĉar venkas Lia grac'.  
 Li siajn idojn benas  
 per amo, fido, pac'.

5. ....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....

6. Kaj fidu Lin, animo,  
 ĉar vin ja tiros Li,  
 eĉ el plej granda timo  
 kaj ĉiam miros vi,  
 se krede vi atendos,  
 ĝis Li en sia hor'  
 por via help' descendos  
 kaj brilo Lia glor'.

...

4. Ne mankas al vi vojo,  
 Kaj ne la rimedar' ;  
 Ja estas por ni ĝojo  
 Kaj beno Via far'.  
 Labor' kaj verko Via  
 Tre gravas ja por ni ;  
 Ho kara patro nia,  
 Ne devas halti ĝi.

5. Kaj kvankam kontraŭstaras  
 Diabloj tie ĉi,  
 Sendube Dio faras  
 Nur kiel volas Li.  
 Jes, kion Li planadas  
 Kaj kion volas Li,  
 Finfine ja venadas  
 Alcele tio ĉi.

6. Esperu, ho animo,  
 Ne malesperu vi,  
 Restadu vi sen timo,  
 Gvidadas vin ja Di'.  
 Se vin malbon' insidos,  
 Ne iru de la voj',  
 Vi certe iam vidos  
 La sunon de la ĝoj'.

...

7. ....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....

8. Kaj kredu, ke Li reĝas  
 eĉ kontraŭ falsa ŝajn'.  
 Se vi persiste preĝas,  
 Li helpos iel ajn.  
 Ne kredu, ke vi devos  
 droniĝi en labor'  
 senfina; ne, Li levos  
 vin al la patra kor'.

9. ....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....

...

7. Nun bonan nokton diru  
 Al zorgo kaj dolor'!  
 Ĝin lasu, ĝi foriru  
 Por ĉiam el la kor'!  
 Vi ne konduki ĉion,  
 Ne zorgu por la bon'!  
 Vi lasu regi Dion.  
 Li sidas sur la tron'.

8. Lin, Lin nur lasu fari!  
 Li estas saĝa reg'.  
 Vi devas mire stari  
 Adore kaj en preĝ'.  
 Ĉar Li laŭ Sia deco  
 Ĝin gvidos al la fin',  
 Kaj la kor-premiteco  
 Lasinta estos vin.

9. Li eble atendigos  
 Dum kelka tempa vin,  
 Kaj eble Li ŝajnegos  
 Indiferenta Sin.  
 Kaj ŝajnos, kvazaŭ volos  
 Li ne plu savi vin,  
 Neniam vin konsolos,  
 Retiros de vi Sin.

...

10. ....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....

11. ....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....

12. Li faros vian vojon  
 plej luma en la fin',  
 preparos por vi ĝojon  
 kaj feliĉigos vin.  
 Jam sonas laŭdo-psalmoj,  
 jam vokas vin la cel',  
 jam logas vin la palmoj,  
 ĉe l' pordo de l' ĉiel'.

...

10. Sed se fidele restos  
 Vi al la patra Di',  
 Savita de Li estos  
 Neatendite vi.  
 Se malgraŭ senkulpeco  
 Suferi devas vi,  
 De l' peza ŝarĝiteco  
 Vin liberigos Li.

11. Ho ĝoju, fidelulo!  
 Donita de l' Sinjor'  
 Ja estas al piulo,  
 Al vi la venka glor'.  
 Folion de la palmo  
 Mem donos Li al vi;  
 Vi kantas laŭ la psalmo,  
 Dankante nur al Li.

12. Ho, lasu esti fino  
 De nia mizereg',  
 En via patra sino,  
 Eĉ malgraŭ sufereg',  
 Restadas ni surtere  
 Kaj post la vivo-fin'  
 Ĉe Vi ni estos vere;  
 Vi ja akceptos nin.

...

*Traduko de la Germana poemo “Befiehl du deine Wege” de PAUL GERHARDT (\*1607-03-12 – †1676-05-27) en Esperanton de HENDRIK ARIE DE HOOG (\*1910 – †2001) en 1954.*

*Arg-546-1100 (2013-07-17 21:48:20)*

*Tiu ĉi traduko troviĝas en la ekumena eklezia kant-libro “Adoru”, n-ro 744. Pri la tradukinto, la nederlanda esperantisto H. A. de Hoog, estas notita io en la vikipedia retejo [http://eo.wikipedia.org/wiki/Hendrik\\_Arie\\_de\\_Hoog](http://eo.wikipedia.org/wiki/Hendrik_Arie_de_Hoog).*

*Traduko de la Germana poemo “Befiehl du deine Wege” de PAUL GERHARDT (\*1607-03-12 – †1676-05-27) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04).*

*Arg-546-1098 (2010-07-03 14:37:37)*

*La unuan, la duan kaj la kvinan strofojn mi, Manfred Retzlaff, korektis laŭ konsiloj de s-ro pastro Albrecht Kronenberger [[Albrecht.Kronenberger@t-online.de](mailto:Albrecht.Kronenberger@t-online.de)].*